
LSG FORUMO n–ro 138 (4 / 2007)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# Perforto estas ofta argumento kontraŭ gejoj en Ruslando



**eksterlanda parlamentano atakata dum maja manifestacio en Moskvo (vidu fokuson)**

ENHAVO


Presindikoj kaj komenca saluto p. 2

**Meksikio kaj UK 07 en Japanio** de Arnold Victor p. 3

**FOKUSO: "Christopher Street Day"-rekolekto**

Ovoj kaj batoj por gejoj kaj lesboj en Moskvo p. 4

Diversaj landoj kaj "Europride" p. 7

Fratinoj de la perpetua indulgenco manĝas sankte p. 9

**AIDOSO: du novaj metodoj mortigi la viruson** p. 10

**TEMOJ**

Pollando, Ugando, Svislando, Usono p. 11

Saud-Arabio, Nord-Ameriko, Germanio p. 12

# L. S. G.

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

prezidanto [arvimide (ĉe) earthlink.net]
Arnold VICTOR, Usono
Apartment 1, 160 West Eleventh Street
New York City, New York 10011, USA

sekretario [lasekretario (ĉe) gmx.net]
kaj kasisto [lakasisto (ĉe) gmx.de]
Rolf, Germanio

varbado [fsoghomonian (ĉe) yahoo.fr]
Francis, Francio

estraranoj [kvakke (ĉe) hotmail.com]
Torstein, Norvegio

retejo [randy.dean (ĉe) pobox.com]
Randy, Usono

## FORUMO 138

**Membrogazeto de la LSG (4 / 2007)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: [laredaktanto (ĉe) gmx.net]
Bernvardo, Germanio, k.a.

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

**!** *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Ni nur pro la favoraj poŝt-tarifoj forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

# Saluton al vi ĉiuj

kolektante la rubrikon "temoj" mi vidis, kiom larĝa la tuta gamo de geja vivo estas en la mondo. Hazarde la du artikoletoj pri Saud-Arabio kaj Germanio troviĝis ĉee kaj mi meditis, ĉu mi vere lasu tion de Germanio, ĉar ŝajnis maldigne enpaĝigi tian noticon iom amuzan kune kun la kruela informo el la araba lando. Sed faktas, ke la mondo estas plena de tiuj ekstremoj, kiujn oni simple ne povas nei, pro kio vi ankaŭ estonte en Forumo trovos tiajn iomete groteskajn kunmetaĵojn.

Krome tio signifas, ke la celo de la gegeja emancipiĝo ankoraŭ ne estas atingita kaj certe ne estos por longa tempo. En tiu ĉi eldono vi do trovos kelkajn artikolojn pri la stato de la samrajteco, inter alie pri kelkaj eventoj ĉirkaŭ la CSD de tiu ĉi jaro.

Ĉar tiu ĉi estas la lasta eldono de la jaro 2007 mi deziras al ĉiuj legantoj tre belajn jarfinajn festojn kaj feliĉan kaj sanan novan jaron 2008

elkore salutas

*Bernvardo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigataj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendata al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesignitaj artikoloj estas de la redakcio.*

## Meksikio kaj UK 07 en Japanio

*El vojaĝa letero de nia prezidanto:*

Mia unua vojaĝcelo estis San Diego, kie okazis kunveno de la estraro de la usona Esperanto-Ligo (mallonge, E. L. N. A.) prepare al la ĝenerala kunveno kune kun la meksika ligo en Tijuana [tiĥuana]. Estis akcepto por geesperantistoj vizitantaj San Diegon ĉe geja paro, el kiu nur unu estas Esperantisto kaj malnova ano de L. S. G. Gregory Wasson [gregori wasn]. Ĉiuj miris je la grandega, meksikstila, luksa domo kun naĝbaseno kaj la grandanime ampleksa manĝaĵaro, per kiuj ni estis regalitaj. Almenaŭ kvar gejaj Esperantistoj, inkluzive iama estrarano Ed Williger kaj mi, ĉeestis. En la kunveno en Tijuana Ed, Gregory, kaj mi estis la solaj al mi konataj gejoj.



De Tijuana mi daŭrigis mian vojaĝon al Japanio. Nur unu post la alia kvar LSG-anoj salutis unu la alian. Neniu rekte respondis al mia anoncita peto por gvidado al gejejoj, do, mi ne vizitis eĉ unu. Nur unu iom dubinda junulo montris intereson al nia afero dum la movada foiro samtempe kun la interkona vespero. Iu iranano dumlonge rigardis sen komento la broŝurojn disponigitajn sur nia duontablo. Ĉar mi estis la unua mendanto de tablo, ni ricevis tiun ĵus je la enirpordo. Certe en Roterdamo estos pli da respondemo al ni, do, mi intencas respondi tuj al la unua anonco pri movada foiro. Atentigu min, se mi hazarde ne rimarkos ĝin.

La kongresaj ekskursoj, kiujn mi partoprenis, montris al mi la plej belan pejzaĝon de Japanio (Nikko, Kamakura), multajn interesajn kulturajn instancojn, kaj bonajn aĉeteblojn en Tokio. La nacia vespero estis aparte bunta kaj riĉa je muziko kaj danco, de klasika ĝis moderna. Ĝi estis tiel rigore organizita, ke estis biletoj kun fiksaj sidlokoj, unuafoja okazaĵo en mia kongresa vizitado. La bona etoso estis promesplena por Roterdamo.

Mi ne povas ne rimarki, ke tiu kongreso estis la lasta prezidita de D-ro Renato Corsetti. Li kun la edzino honoris nin per vizito al du niaj kongresaj jarkunvenoj. Mi konsterniĝis, trovante lin meze de la krizo en la Centra Oficejo dum kaj post lia enposteniĝo en la jaro 2001. Tamen, tra kelkaj jaroj, li plene glatigis la aferon; estis kaj instrue kaj bele vidi lin senegoisme en evidente amikaj rilatoj kun tiuj, kiuj kritikis kaj satiris lin. Li montris sin komprenema al gejoj, kaj estas bona espero trovi estontajn prezidantojn kaj estraranojn de UEA duone tiel komprenemaj kaj bonkondutaj pri nia afero.

**Arnold Victor, aŭgusto 2007**

# Ovoj kaj batoj por gejoj kaj lesboj en Moskvo



Cappato

La naciistoj kaj radikalaj anoj de la ortodoksa eklezio jam atendis antaŭ la urbestra oficejoj en majo 2007. La 50 gejrajtaj aktivuloj tie kolektiĝantaj konfrontis agitan amason de pluraj centoj da malamaj homoj, kiuj parte kriaĉis "Morton por la gejoj", "NE! al pederastio" kaj "Moskvo ne estas Sodom" aŭ parte portis, nigre vestitaj kaj batalotitaj, sub ĥoralaj kantoj ĵus de orto-oksa pastro benitajn krucojn kaj ikonojn en la batalon inter Bono kaj Malbono.

Ne daŭras longe ĝis ovoj kaj tomatoj trafas la pace manifestantan grupon. La multkapa policistaro eĉ ne protekte reagas, kiam aro da brutalaj haŭtkapuloj sin miksas inter la grupo, disŝiras ĉielarkajn flagojn, kaj ekbatas kaj tretas, ĝis fluas sango. Nur poste la sekurigaj fortoj iomete trankviligas la situacion, tamen lasas libere forkuri la perfortantojn.

Antaŭe en nobla hotelo okazis la temrilata internacia kongreso kun 150 partoprenantoj, kvinoble la nombro de la lastjara simila kongreso, kaj tiel vera sukceso sub tiaj malfavoraj kondiĉoj. Demonstracion planitan, tamen malpermesitan de la Moskva urbestro Jurij Luŝkov, oni nuligis en la lasta momento por ne danĝerigi pacajn demonstrantojn. Tamen peticion subskribitan de pli ol 50 membroj de la Eŭropa parlamento kaj enhavantan la peton permesi tiajn eventojn la malgranda delegacio spite volis liveri al Luŝkov.

Sed nur kelkajn momentojn post lia alveno ekster la urbestra oficejo (tiu sama urbestro, kiu antaue nomis samseksemajn 'satanecaj'), oni ŝovis la 23jaran estron de GayRussia, Nikolai Aleksejev, en polic-kamioneton kaj forkondukis lin, sama sorto trafis la kunorganizantojn Nikolaj Ĥramov kaj Sergej Konstantinov, kune kun 12 aliaj teamanojn, kaj ili devis resti 24 horojn en prizono kaj poste pagi monpunon.



Tatchell

Dum la postaj tumultoj brita porgejrajta aktivulo Peter Tatchell [pitr taĉel] ricevis plenvizaĝan pugnobaton de kontraŭprotestanto, la germanan parlamentanon Volker Beck [folker bek], kiu jam en la pasinta jaro partoprenis tiean gejfieran manifestacion, trafis tomatoj kaj du ovoj kaj vundis lin kaj li dum horoj estis arestita de la speciala trupo "Omon" (por lia protekto, kiel oni asertis lin) same kiel Marco Cappato [marko kapato], itala membro de la Eŭropa parlamento, kiu demandis, kial polico ne protektas manifestaciantojn, dum li klopodis protekti parlamentan helpanton el Strasburgo.

La nederlanda Eŭropa parlamentanino Sophie in't Veld [sofi int feld] estis minacata per stileto kaj kuris same kiel la pop-dueto t.a.T.u. protektoserĉe en restoracion. Richard Fairbass [richard ferbas], bandano de la muzikgrupo "Right Said Fred", ricevis sangantan nazon kaj sangokovritan vizaĝon. Observante ĉion, 24-jaraĝa lesbanino Lidia Ĥmelevskaja deklaris, ke nun regas en Rusio aŭtokratio en totalismiĝanta socio.




**Cappato kaptita de OMON**



**Aleksejev**

Nikolaj Aleksejev deklaris, ke li trairos ĉiujn juĝejajn instancojn, eĉ ĝis la Eŭropa kortumo por homaj rajtoj en Strasburgo, por pruvi, ke li estas senkulpa, kaj esperas i.a. je fotisto, kiu tie faris multajn fotojn montrantajn la okaziĝon. Ne la unuan fojon tiu instanco okupiĝas pri la sama motivo, ĉar ankoraŭ estas traktata tie kontraŭpledo kontraŭ la lastjara malpermeso de la CSD-demonstracio 2006 en Moskvo.

En septembro Moskva distrikta juĝejo decidis, ke la polica malpermeso de la demonstracio kaj la enkarcerigo de la ĉ. 20 personoj estis leĝa, kun la argumento, ke la rusa konstitucio nenie garantias la rajton de libera kolektiĝo por gejoj aŭ lesboj. Nikolaj Aleksejev tuj post la juĝo deklaris, ke li iros al la Eŭropa juĝejo por homaj rajtoj en Strasburgo

**helpe de informoj de Brian**

## Brazilo: protekta leĝo postulata

En la Brazila megaurbo Rio de Janeiro [ĵanejro] paradis en oktobro 800.000 homoj en la stratoj por batali por leĝo kontraŭ homofobio [malamo gegejojn]. Laŭ raportoj de gesamseksemulaj grupoj, dum la lastaj dek jaroj estas mortigitaj 2.600 homoj en la lando pro sia samseksemo. Krome la demonstraciantoj postulis, ke la registaro en Brazilo finfine enkonduku registritajn partnerecojn. Pri la samseksa edziĝo oni diskutadas en la parlamento de pli ol jardeko jam.

Je la 12a CSD-parado en tiu ĉi jaro sur la mondfama plaĝo de la Copacabana [Kobakabana] partoprenis i.a. pluraj altrangaj politikistoj, inter ili la unan fojon ankaŭ la guberniestro de la la federacia ŝtato Rio, Sérgio Cabral [serĵiu kabrau].



En junio okazis la monde plej granda kaj pro sia bunteco kaj festeco fama CSD-parado en la brazila metropolo São Paulo kun pli ol 3.000.000 partoprenantoj protestantaj kontraŭ rasismo maĉismo kaj homofobio, kaj postulantaj samrajtecon por si. Partoprenis krom la urbestro ankaŭ pluraj ministroj de la registaro. La unuan tian paradon en 1997 partoprenis nur 2000 homoj, lastan jaron 2,7 milionoj.

Kelkajn tagojn antaŭe estis protestintaj 1.000.000 da evangelikalaj kristanoj kontraŭ samseksemo.



## Kartvelio : ekcitego pro "CSD"

La organizantoj de gejunula demonstracio por tolereco, subtenata de la Eŭropa Konsilantaro, devis malokazigi tiun por la kartvela ĉefurbo Tbiliso planitan eventon, post kiam komunikiloj diskonigis la (malĝuŝtan) informon, ke temas pri CSD. "Pederastoj sin preparas por parado en Tbiliso" tekstis ekz. la gazeto "Alia". Kaŭze de tio oni minacis per mortigo kunlaborantojn de la homrajta organizo "Century 21" [sentŝri twenti ŭan], la organizanto de la evento.

La demonstracio estis planita en la kadro de la kampanjo "Ĉiuj malsamaj

– ĉiuj samaj" de la Eŭropa Konsilantaro celanta kutimigi gejunulojn al dialogo interkultura kaj interreligia.

Laŭ la artikolo de la gazeto "Alia" grupo de gesamseksemuloj nomata "Inklusiv" estis parto de tiu virtuala "CSD". La buroo de la grupo troviĝas en la sama domo kiel "Century 21". La grupo nenion diris pri la disputo, ĉar laŭ ili tio momente estis tro danĝera kaj nur pliboligus la jam ardan etoson inter la loĝantaro.

Post la publikigo de la "Alia"-artikolo la kartvela-ortodoksa eklezio eldonis gazetaran informon, per kiu ĝi kritikas samseksemajn tendencojn en la lando: "Nacio, kiu ne malpermesas malĝustajn sekseman orientiĝon kaj vivstilon, estas de principo malbenita de Dio".



## Pollando CSD sen molestoj

Mirige, ke el Pollando direndas bonaĵo pri CSD-evento. En la okcidenta urbo Poznan partoprenis novembran CSD'n pli ol 300 aktivuloj, kiuj postulis de la nova registaro la agnoskon de samseksaj pariĝoj. En 2005 la CSD kaŭzis sensacion, ĉar post malpermeso de la parado policioj perforte aktivis kontraŭ partoprenantoj kaj arestis kelkajn 60 partoprenantojn. Tiun ĉi jaron male ĉ. 400 policistoj protektis la demonstracion kontraŭ atakumoj de unuopaj dekstraj ekstremuloj.

**"Europride" – Eŭropa gejfiero**

En Varsovio okazos la "Europride"-spektaklo en la jaro 2010. Tion decidis en septembro la Eŭropa organizo de la CSD-organizantoj EPOA. La CSD en Varsovio estis en la lastaj jaroj ĉiam tre prikverelata, ankoraŭ en 2005 ĝi estis malpermesata de la tiama urbestro kaj nuna pola prezidanto Lech Kaczynski.,

EPOA volas per tiu unua Europride en Orienta Eŭropo meti signalon: " Ankaŭ aliaj urboj kiel Moskvo kaj Rigo devas lerni, ke ne estas akcepteble bari de la gejoj kaj lesboj la rajton esti en la publikeco", deklaris la EPOA-ĉefo Robert Kastl.

La Europride ekde 1992 okazas ĉiun jaron en alia urbo, ekzemple en 2004 en Hamburgo. En la venonta jaro ĝin organizas la sveda ĉefurbo Stokholmo, kaj por 2009 la sviza urbo Zuriko ricevis la jesdecidon.

## Litovio: malpermeso manifestacii

La urbestro de la ĉefurbo Vilno en oktobro malpermesis manifestacion okaze de la ĉefkonferenco de ILGA-Europe [ILGA jurop], grupo aktiva por la gegeja samrajtigo. Al la konferenco venis 200 delegitoj el tuta Eŭropo. ILGA-Europe elektis Litovion, ĉar tie la

gegejaj aktivuloj estas sisteme malhelpataj dum siaj aktivecoj. Ekzemple la CSD-parado ĉi-jare estis malpermesata laŭfame pro kaŭzoj de sekureco.



La ILGA-manifestacio nun estis malpermesata oficiale tial, ke troviĝas konstruejo ĉe la okazigejo. La konferenco nomis la agadon de la administracio skandalo. La urbo eĉ rifuzis proponi aŭ permesi alternativan lokon.

La Litova gegeja ligo LGL krome malsukcesis juĝeje nuligi la malpermeson. Nun la aktivuloj volas plendi antaŭ la Europa Juĝejo por Homaj Rajtoj en Strasburgo/Francio. Tiu jam en majo deklaris, ke la malpermeso de la CSD en Varsovio/Pollando kontraŭis kaj la fundamentan rajton je libera kunvenado kaj la malpermeso de diskriminado.


## Hungario kaj Kroatio: perforto

Certe daŭros ankoraŭ longa tempo ĝis gegejoj en orienta Eŭropo povos resti sen timo pri fizikaj atakoj, kiel montras eventoj en julio en Hungario kaj Kroatio.

Tiel en Budapeŝt ĉ 2000 partoprenantoj de la CSD-parado estis surĵetita de plurcentoj da "skinheads" [haŭtkapuloj] kaj neonazioj per putraj ovoj kaj fumobomboj. La polico de la Hungara ĉefurbo arestis plurajn tumultulojn, vundita estis neniu. Ardigitaj estis la gejmalamaj protestoj per la mema malkaŝigo kiel gejo de la Hungara ŝtata sekretario Gabor Szetey [gabor setej] tagojn antaŭe.

Pli danĝera estis la Zagreba varianto. La polico devis malhelpi atakon al la CSD-parado, kiun partoprenis nur ĉ. 200 gejoj kaj lesboj, per Molotov-kokteloj. Ĉ. 20 personoj estis jam ekflamintaj la per benzino plenigitajn botelojn, kiam la polico ekagis. Sep de la atakantoj, inter ili kvar junuloj estis arestitaj.

Antaŭe kontraŭis la CSD-on jam pluraj naciemaj, katolikaj kaj milit-veteranaj grupiĝoj de la lando.



**duople sola de FF**

# Fratinoj de la perpetua indulgenco manĝas sankte

La fratinoj de la perpetua indulgenco [perpetua ~ senĉesa] kaŭzas ekscitojn en Usono, ĉar du reprezentantinoj de tiu ordeno ricevis la sanktan manĝon dimanĉe en siaj plendekoraj kostumoj



en katolika preĝejo de kvartalo Castro [kastro] en San Francisco. La Ĉef-episkopo George Niederhauer [ĝorĝ nidraŭr], kiu gvidis tra la diservo, post kelketa hezito donacis al la du fratinoj la oblaton, kiu en la katolika tradicio estas la simbolo de la korpo de Jesuo Kristo.

Pro tio ekŝtormis komunikila uragano. La populara komentistoj Bill O'Reilly [orejli] de dekstrema novaĵa elsendejo nomis la okazaĵon "monstrecan agon de hontendo". La fratinojn, kiuj fakte estas fratine kostumitaj viroj, li etikedis kiel "militemaj gejoj" kaj respondecigis la demokratan urbestron Gavin New-som [gevin njusm] por tiu kadukiĝo de la moraro.

Katolikaj aktivuloj kritikis la ĉefepis-kopon, ĉar li festis la diservon ĝuste je la tago de la gejlesba stratoparado, kaj tiel laŭ ili bonjuĝis subparole la samseksemon. "Eĉ Judaso ne farus tian malrespektindan". deklaris Antony Gonzales, reprezentanto de konserva-tiva katolika viraro al loka elsendejo. Je la esplordemando de ĵurnalisto, ĉŭ vere li komparas la ĉefepiskopon al la biblia perfidulo, pro kiu laŭ la biblia legendo Jesuo estis najlita al la kruco, Gonzales diris: "Jes, li estas Judas-pastoro".

La buroo de Niederhauer deklaris post la ŝtormo, ke la ĉefepiskopo ne estis rekoninta la fratinojn. Li pardonpetis de ĉiuj katolikoj kaj nomis sian agon "eraro".

La fratinoj skribis al la eklezia paroĥo, ke la ambaŭ reprezentantinoj de la or-denoj estas katolikaj kaj simple volis ricevi la sanktan manĝon same kiel aliaj katolikoj ankaŭ.

La fratinoj de la perpetua indulgenco aktoras mondskale, aparte je CSD-eventoj. Ili kolektas monon por gejaj, lesbaj kaj transgenraj projektoj kaj antaŭ ĉio subtenas la aidoso-preven-ton. Al la ordeno mondskale apartenas pli ol 1500 fratinoj.

---

Redakciaj Notoj:

- *En Forumo 137 la paĝonumeroj en la kolumno "enhavo" estas malĝuste, mi petas pardonon. Neniu estas perfekta …*

# A i d o s o : du novaj metodoj mortigi la viruson

Videble en la esploro de la HIV-viruso okazas vere interesaj progresoj en la nuntempo. Post la sukceso eltranĉi la jam enplektita genaro de la viruso ree el la genaro de la ĉelo (vidu lastan forumon) nun estas prezentataj du novaj metodoj de la lasta tempo:

Ĉe la Zurika universitato la esplorista grupo ĉirkaŭ Karin Mölling [Meling] trovis ruzan atakan punkton


Dum la infektigo la viruso injektas la DNA-fadenon, kiu portas la heredajn informojn, en ĉelon de la homa korpo, kie la fadeno estas negative kopiata, kaj nur tiu kopio estas uzata por reprodukti la viruson. Post la farado de la kopio la originalo normale estas detruata per la enzimo ribonukleaso H, kiu estas logata al sia laboro per la ekekzisto de la kopio.

La svisaj esploristoj nun produktis iujn malgrandajn molekulojn, kiu ŝajnigas al la enzimo esti tia kopio, sed faras nenion plu. La enzimo do "kredas", ke la kopiado de la virusa hereda fadeno jam estas plenumita kaj detruas la originalon. Tiel oni instigas la viruson al speco de memmortigo.

La bonega afero en tiu metodo estas, ke la partumoj, kiuj aktoras dum tiu procezo, ne aŭ ne multe mutacias. La tre ofta mutaciado de aliaj virusaj partoj ja estas normale granda problemo en la batalo, ĉar ĝi ofte kaŭzas, ke la viruso ne plu reagas al kutimaj medikamentoj.

Oni montris jam, ke la metodo ne nur funkcias sub laboratoriaj cirkonstancoj sed ankaŭ en vivaj korpoj. Krome ĝi ankaŭ efikas al virusaj tipoj, kontraŭ kiuj ĉiuj medikamentoj ne plu efikas.

Ĉiuj tiuj sukcesoj tamen estas nur la komenco de evoluiga proceso, kiu signifas, ke ĝis la utiligo de la rezultoj certe pasos ankoraŭ multaj jaroj.



La dua metodo estas la invento de esploristoj de la usona "Arizona State University" en la teamo de Kong-Thon Tsen. Ili evoluigis UV-laseron povantan elsendi lumimpulsojn de nekredebla daŭreto de nur 1 femto-sekundo, kiu estas $10^{-15}$ sek. Tiel ili povas kalibrigi kaj dozumi la aparaton tre precize kaj sukcesis detrui perresonance virusojn aŭ bakteriojn tre specife sen difekti ĉirkaŭajn histojn aŭ aliajn ĉelojn.

Momente la lasero estas utiligebla por desinfektaj celoj, sed ĝi estas espero por homoj, kies HI-virusoj ne plu estas atakeblaj per medikamentoj. La granda problemo estas ekzakte trafi virusojn en la korpo. Unua ŝtupo tamen povas esti alradiumi almenaŭ la sangon ekster la korpo kiel ekz. dum dializo.

Ĉar nu ambaŭ metodoj bezonas pluan longan tempon, ĝis ili funkcios en la medicina ĉiutago kaj ĉar ne estas certe, ke ili funkcios centprocente, restas tamen, kiel estis dum jardekoj jam, la plej bona sana metodo la uzo de kondomoj.

# T E M O J ° ° ° ° °

## Pollando: nova parlamento elektita

En oktobro Pollando elektis novan parlamenton, pro kio la ĝisnuna ekstreme konservativa registaro sub Kaczynski [kaĉinski] perdis la necesan plimulton. La partio de Giertych, kiu ja postulis novan leĝon, kiu tre akriĝus la situacion de la gegejoj en la lando (ni raportis) malkreskis de 8% al 1,3% kaj ne plu havos sidojn en la parlamento. La novaj elektoj necesis jam post du jaroj, ĉar la reganta koalicio frakasiĝis. Plej forta nun estas la partio de Tusk mezgrade konservativa kaj multe pli malferma al Eŭropa kunlaboro. Tamen ankoraŭ la ĝemela frato de la ĝisnuna ministrestro estas pola prezidanto ĝis 2010, kaj havas "veto"-rajton, kiun la parlamento povas nuligi nur per minimume 60% de la voĉoj.

## Ugando: Muftio por ekstermi gejojn

Gvida islama muftio postulis, ke oni translokigu ĉiujn gejojn de la lando sur neloĝatan insulon en la lago Viktoria, kie ili restu por morti, por ke la lando fariĝu libera de samseksemo. Ŝejko Ramatan Ŝaban Mubajje, kiu proponis tion al la uganda prezidento, je tio deklaris, ke la tolerado de gejoj kondukus al nehaltigebla disfalo de la moroj. Laŭfame nenio dum tiuokaza renkontiĝo diris ion kontraŭ la propono. Jam en aŭgusto, kiel reago al la unua gazetara konferenco de grupo geja, formiĝis junulmilico kontraŭgeja, ĉar laŭ ili la administracioj nenion faras kontraŭ gegejoj kaj amoristinoj. En la lando loĝas 13% islamanoj.

## Svislando: multaj gejaj kandidatoj

Tiom multaj kiom ĝisnun neniam samseksemaj kandidatoj aspiris en la elekto al la nacia konsilantaro de Svizlando, la granda ĉambro de la parlamento, meze de oktobro. Laŭ la raporto de la gazeto Akut disponigas sin 16 gejoj kaj 13 lesboj por la sidoj. En la pasita parlamento oni trovis tie nur du (senkaŝajn) inter 200, nome s-ron Janiak kaj s-inon Huguenin. La plej multaj el la kandidatoj estas de la maldekstra flanko, t.e. 22, pliaj kvin sin komprenas kiel politike meza, kaj du apartenas al la dekstra flanko. Unu el tiuj lastaj estas la 41-jara Thomas Fuchs de la dekstrema Sviza Popola Partio SVP. Li konfesas, ke komence multaj sentis problemojn pro lia gejeco, tamen li taksas ĝin kiel postrangan en la gamo de siaj temoj. Li subtenas la politikan linion de sia partio malpermesi al gejoj kaj lesboj la infanoadopton.

## Usono: Atentu pri gej-indikoj

La profesia ligo AAP (amerika akademio de pediatroj) decidis novajn gvidliniojn, per kiuj alvokas ĝi infankuracistojn atenti pri signaloj de gejeco ĉe adoleskantoj por preventi memmortigojn. "Infankuracistoj povas malaltigi la kvoton de memmortigoj inter junaj homoj, se ili serĉas indikojn de depresioj kaj memortigaj pensoj. Tial ili rutine pridemandu tiujn pri oscilantaj humoroj, seksumaj orientiĝoj kaj aliaj risko-faktoroj por memmortigo", tiel la raporto de la decida kunveno. Inter 15 ĝis 19 jaraĝaj homoj la memmortigo estas la trie plejofta kaŭzo de morto, deklaris la AAP, multaj de la senesperantoj ne povis adaptiĝi al sia

samseksemo. Pluraj internaciaj studprojektoj dum la pasintaj jaroj eltrovis, ke la kvoto de memmortigoj inter junaj gejoj kaj lesboj estas multe pli alta ol inter malgejaj gejunuloj. Ekzemple iu irlanda studprojekto malkaŝas, ke jam kvarono de la junaj gejoj en la brita provinco jam transvivis memmortigan provon.

La AAP dum la lastaj jaroj kaŭzis disputojn, ĉar la organizoj postulis pli severajn kontrolojn pri armiloj pro lernejaj masakroj aŭ akcidentoj. Krome ĝi postulas la rajton por samseksemaj paroj adopti infanojn por ebligi al pli multaj infanoj hejmojn.

## Saud-Arabio: 7 0 0 0 vipobatoj

Per tre kruela puno finiĝis en Saud-Arabio geja epizodo. Ĉar ili amoris kune, du viroj de tiu lando estis punita per po 7000 batoj de la vipo en El Baha en la sudo de la reĝlando. La gardistoj ne donis al la viroj ĉiujn batojn dum unu fojo, sed tiuj estis dispartigitaj trans pluraj tagoj por ne tute mortigi la virojn. La justico de la reĝlando Saud-Arabio fundamentas en la Ŝaria-leĝaro, kiu metas sub punon la amoron inter gesamseksemuloj kaj inter ne edziĝintaj viroj kaj virinoj.

## Nord-Ameriko: splitiĝo pro benoj

La anglikanaj diocezoj en la kanada provinco Kebekio kaj la usona ŝtato Kalifornio decidis doni ekde nun benojn al samseksaj paroj. En Montreal [Moreal] la dioceso decidis kun 103 jesaj kontraŭ 57 neaj voĉoj beni gejajn kaj lesbajn parojn. La najbara provinco Ottawa [Otava] unu semajnon pli frue simile dedidis. Per granda plimulto ankaŭ en San Francisco [san francisko] la ekleziaj reprezentantoj decidis doni benojn al gegejaj paroj. Ankoraŭ estas necesa la konsento de la episkopoj por ambaŭ decidoj.

Per tiuj decidoj profundiĝas la abismo inter la nordamerikaj anglikanoj favoraj al samseksemuloj, kaj la gefratoj en kredo de Afriko, kiuj rigardas kiel peko kaj krimo la samseksamon. Pastoro Paul Jennings [pol ĝenings], kiu en Kebekio la pledon por benodonon de samseksaj paroj prezentis por decido, nun atendas splitiĝon de la eklezio: "Ĉu tio disfendas la eklezion? Ĝi jam estas disfendita. Ni revus, se ni opinius, ke ni povas savi ion ajn tiurilate", li diris dum intervjuo.

Mondskale la anglikana eklezio havas ĉirkaŭ 90 milionojn membrojn.

## Germanio: purigi la krozadejon

En la ĉefurbo Berlino la arealo apud la kolono de l' venko en la parko Tiergarten [bestoĝardeno] estas tre fama krozadejo, kie viramaj viroj serĉas tujan amoron. La kontraŭperforta projekto MANEO nun alvokas sub la moto "Pli bele krozi – granda purigo en la Tiergarten" volontuloj, por ke ili purigi tiun lokon en novembro de malapetitigaj postlasaĵoj kiel uzitaj kondomoj, papertukoj ktp. por iomete plibonigi la prestiĝon kaj de la urbo kaj de la gejoj, kiujn malŝati la tagaj vizitantoj ja povas havi kaŭzon, se ili vidas tiajn atestaĵojn de noktaj umadoj. Krome la ĝardena administracio jam plendis plurfoje pri tiu malbela aspekto kaj nomis ĝin "ne plu tolerebla", kio estas ia minaco de publika interveno.